



NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

N° 24 - JUNIO 1973 -

Redaktas : Sro JOUIS - 62I, rue Georges Mugnier
76 - BOISGUILLAUME -

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de Februaro - 10a de
Majo - 10a de Aŭgusto - 10a de Novembro -

BABELA TURO DAŬRE KONSTRUIGAS...

Estas konate ke kelkaj nacioj ekprovas trudi sian lingvon al aliaj popoloj. Tia ⁿkostato ne estas novaĵo sed, en la nuna tempo, tiu "batalo por superi" akriĝas ~~pro~~ komercej motivoj...

Neeviteble, vortoj eksteraj enmiksiĝas en la naciaj lingvoj : la lingvanoj timas ke sia lingvo perdu ĝian originan karakteron. Tiel, la Prezidanto de nia Respubliko provas oficiale forigi anglo-devenajn terminojn el la franca...

Aliaj nacioj rezistas alimaniere : ek de la unua de Junuaro 1973, la Registaro de Libio ne plu akceptas la pasportojn en kies redaktado la araba lingvo ne estas unu el la uzataj linvoj.

Tiuj faktoj kreas etson kiu incitas al plivigliĝo de la provincaj lingvoj kaj idiomoj, kiuj reagas siavice kontraŭ la naciaj lingvoj. Efektive, diversaj homoj ekkonscias pri la "folkloro" valoro de sia dialekto ~~kiel~~ *kiel* vala denaska esprimilo, kaj sentante la forpuŝon de l'progreso, akrociĝas al tiu vivanta

.../...

..... atestilo; sekve, ankaŭ ili "purigas" siajn vortprovizojn, forĵetante la ne-naturajn esprimojn. Ni citu en Francujo nur la Bretonan kaj la Okcitanan lingvaĵojn, kiuj ĝuas sukcesan revivigon.

En Kimrujo (Briĵujo) la Kelta lingvo konas novan vigecon; ĝi ne nur estas instruata en la lernejoj de la provinco, sed la instruado ĝenerala estas farata en tiu lingvo en pluraj lernejoj, kaj en kvin Universitatoj, radio kaj televido elsendas plurfoje en la kelta; dulingvaj montriloj estas videblaj depost 1969, (angle kaj kelte) - la Registaro subvencias ĝian instruadon, kaj per 800.000 pundoj subtenis la Kimran Kulturon...

En la provinco Karintio (Aŭstrujo) vojmontriloj dulingvaj (germane kaj slovene) kaŭzas malagrablecojn, ĉar la germanlingvanoj preferus la nuran uzon de sia lingvo ...

Ĉu ili pravas? Trifoje jes !!

Unue, ĉar tia intermiksigo lingva fidas neeviteble la belecon kaj la propran karakteron de la esprimiloj.

Due, ĉar tia mikspoto de lingvoj estigos Babelan fiĵlingvaĵon: pli kaj pli da konfuzo pro la misimileco de sencoj de la radikoj (la signifo de la vortoj varias de lando al alia, la metiaj ĵargonoj ankaŭ) Pluse, la malsimileco de la konstruo de la frazoj kondukas al monstraĵoj...

Trie, pro la konstato ke neniu folkloro, provinco, aŭ nacie lingvo taŭgas por internacia utiligado.

Por kelkaj feliĉuloj, fuŝado de aliaj idiomoj ne estas necese por interkompreniĝi internaciskale. Estas la uzantoj de Esperanto, la lingvo tutspeciala ellaborita por tiu celo, kiu oportune evoluas en la tempo laŭ la demando de la progreso kaj de la neevitebla intermiksigo de la popoloj, sen ia perforto al la iliaj idiomoj, la lingvo kiu pruvis, pravas, kaj plu pruvos sian taŭgecon....

J. Gibaux.

V I V O D E L A G R U P O J

YVETOT.-

----- La Van de Aprilo, Gilbert BETTENCOURT prezentis dia-
pozitivojn pri siaj vojaĝoj, precipe al Germanujo okaze de
interŝanĝo en la kadro de la ĝemeligo de Yvetot kun Hemmingen-
Westerfeld.

Ges-roj Ben Weber, el Nederlando, haltis dufoje en
Yvetot, kie ili gastigis ĉe Ges-roj Pottier, dum sia vojaĝo al
Bretonio dum la Paskaj ferioj, kaj vizitis la regionon. Renkon-
tiĝo kun la grupanoj estis projektita, sed na povis okazi pro
lasmomenta datŝanĝo en la programo de la revenvojaĝo de Ges-roj
Weber.

Unu yvetotano ĉeestis en Parizo la Kongreson de la
Normanda Federacio.

La kurso bone funkcias kun 4 lernantoj.

GRAND-QUEVILLY.-

----- Dum Paskaj tagferioj, nia samideano JOUVIN
partoprenis studan semajnon; sub la gvidado de Profesoro Ribot,
en kastelo Grezijeno. Li prezentis tie, iun vesperon, lian
amatoran tre modestan filmon " De RUENO ĜIS NORDKABO ". Malgraŭ
ĝia modesteco, saĝnis ke tiu filmo bone interesis la vidintojn.

Ĉe la kastelo, li renkontis malnovajn esperantistajn
amikinojn, inter ili, la bone konatan Sinjorinon Gibez, aktiva
prezidentino de " Kreska Stelo " kiu post tiu studa semajno
venis viziti nian Normandan ĉefurbon kaj multe interesiĝis pri
la Ruenaj historiaj monumentoj. Nia samideano Jouvin gvidis la
ĉiam ageman sinjorinon tra la malnovaj kvartaloj de la urbo
kaj per " esperanto " faris la komentojn.-

OU VI SCIIAS ??

===== ke duonhora intervjuo pri Esperanto
okazis ĉe la radio-stacio " France Inter, fine de Februaro

LE HAVRE.-

----- Alvoko al Havraj Gesamidenoj :

S-ro Colleu donacis Esperanto-librojn al la Urba Biblioteko, por uzo ĉe la prunta sekcio de la biblioteko : Iru kaj prunteprenu tiujn librojn ! (por via enskribo al tiu senpaga servo, kunprenu identecan karton kaj freŝdatan kvitancon).

La Biblioteko estas malfermata :

marde	)	13 h 30 ĝis 17 h 30
merkrede		
vendrede	)	
sabate		

ĵaŭde (15 H. ĝis 19 H.

Kompreneble, se vi posedas duoblaĵojn en via propra kolekto de Esperanto-libroj, vi povas fari donacon, atentigante ke estas por la prunta sekcio de la Biblioteko.

Krome ni memorigas ke, en la " konsulta " sekcio 300 titoloj estas je via dispono por surloka studo.

Pasintan semajnon, ni lernis per televido kaj gazetoj la eniron en la Francan Akademion de la fama aŭtoro de " Bobosse ", André Roussin. La artikolo en nia havra gazeto estis malgranda kaj eble multaj personoj ne vidis tiun frazon " La teatraĵo (oni parolas pri Bobosse) estis ludita 1.500 fojojn sen halto kaj estis tradukita en ĉiuj lingvoj, eĉ en Esperanto."

Tio montras ke nia lingvo ne indiferentiĝas certajn personojn, sed ili estas tro malmultaj.

Sylvie Caron -

La 13an de Majo, en la kadro de Ekspozicio pri la laboraĵoj de la lernantoj estis aranĝita -Ro Colleu kaj de la lernantoj, Esperanto Ekspozicio.

Estis tre multe da vizitantoj, pluraj demandis informojn.

.../...

.... Ĝenerala alvoko D X

F l K A O alvokas

Tre verŝajne, multaj inter ni ne komprenas la signifon de tiuj literoj ! temas tute simple pri kodo de Radio-Amatoro !

Sekve, se vi havas emon je tiu okupo, pristudu ĝin !

Sciu tamen ke la membroj de la Radio-amatora Societo en Le Havre deziras interkompreni unuj la aliaj tra la tuta mondo.. tial ili lernas Esperanton (Kurso de S-ro Chalm = 10 interesatoj)

Noto : " F l K A O " estas la numero de la Radio-sekcio ĉe la Junulardomo en Le Havre.

NORMANDOJ !

Cu vi intencas aranĝi ekspozicio en via loko ?

Tiam, petu informojn de S-ro Chalm - 8, place Albert René - 76600 - LE HAVRE -

Li bonvolas pruntedoni al vi necesuloj : 3 mapoj sur lignaj paneloj (retoj de delegitoj de U E A, bildaro pri Lenigrado) 1 panelo kun bilkartoĵoj pri diversaj landoj; 1 panelo kun kovertoĵoj filatele afrankitaj; kadroj kun poŝtmarkoj el Rumanio kaj Sovetunio.

ĈU VI SCIAS ? ?

=====

..... ke en San Diego (Usono), grava filio de la Universitato de Kalifornio, enkondukas oficialan kurson " Lingvo Esperanto "

(Heroldo)

..... ke la ĵus okazinta Foiro de Milano uzis afiŝojn en Esperanto.

(Pilo Pres)

..... ke Pola Radio anoncis novan konkurson : petu tuj la tekston al : Pola Radio - Esperanta redakcio - Varsovio - Pollando - (La konkurso estas simpla kaj nepolitika)

(Radio Varsovio)

LE HAVRE -

 Pri la Amikeco-Kongreso organizita de S-ro
 Delaire, en la Kastelo GRESILLON - 19-20 Majo 1973 :

Ĉeestis kvardeko da partoprenantoj; mi povas nur paroli
 pri la dimanĉa tago, ne ĉeestinte la sabaton !

Je la duono post la oka okazis la matenmanĝo, poste oni
 babilis kaj kelkaj ludis tablotenison. Je la deka matene, por la
 interesitoj okazis la meso (katolika) en la preĝejo de Viel-Baugé,
 tre malnova preĝejo kies partikulareco estas ardeza turo inklinita
 kaj spiralita. Tiu meso estis : parte en la franca, parte en la
 latina kaj, parte en la esperanta lingvoj; ankaŭ partoprenis la
 enloĝantoj.

Poste, sub la gvidado de la pastro Léon Goudé, ni vizitis
 ekspozicion de la loka junulara grupo, pri Japanujo, kaj ĉeestis
 lumbilda projekcio, tre originale farita de la junuloj. Oni trinkis
 lokan vinon kaj manĝis kringojn !

Post reveno al Gresillon, okazis la foto por la ĵurnaloj;
 en tiu ĵusa tempo ankaŭ okazis hajlado ! sed feliĉe ne daŭris.

Baldaŭ ni ĝoje tagmanĝis kaj babiladojn ni multe aŭdis.

Poste, ni veturis ĝis Angers, kie ni vizitis en la liceo
 "Chevrollier" ekspozicion pro Koperniko kaj Pollando, laŭ afabla
 invito de S-ino Cheverey kaj S-ro Gaubert, kiuj preparis, kun la
 junuloj de la loka grupo, tiun ekspozicion. Tie, ni vidis historion
 pri Pollando, pri Koperniko, ilustraĵojn pri belaj polaj folkloraj
 kostumoj, laŭ la regionoj, kaj maltaĵajn polaĵojn.

Poste, ni vizitis la bone konservitan Kastelon de Angers
 kun ĝiaj muregoj kaj internaj ĝardenoj, ankaŭ ni vidis la tapiŝe-
 gojn de la katedralo, nun prezentitaj en la kastelo. S-ino
 Cheverey faris la esperantajn komentojn.

Ni ankaŭ vizitis la katedralon kaj la straton Zamenhof.

Post veturado tra la bela regiono Loire, ni revenis en
 Gresillon, kie okazis la verspermanĝo. Post longa babilado ĉe la
 tablo, kelkaj partoprenantoj veturis ĝis Le Lude (eta urbo kie
 dum la somero okazas belaj spektakloj en la malnova kastelo, en
 Franujo, oni nomas tiujn spektaklojn "Son et Lumière" sono kaj
 lumo) ili okazas nokte kaj prezentas la malnovan historion de la
 lando; sed, ankoraŭ ne estis la sezono kaj ni vidis nur la stelojn!

Je noktomezo, oni adiaŭis, esperante aliajn renkontojn en
 aliaj kongresoj aŭ en la bela kastelo "Gresillon".

Ĉiuj kunportis bonajn memoraĵojn kaj konatiĝis novaj
 amikoj kaj diris "Ĝis baldaŭ".

Alain Chalm -

ĈU VI SCIAS ? ?

..... ke en Cesena (Italujo), la Direktoro de la
 lernejo "Oltro-Savio" enkondukis Esperanton en la trian, kvaran
 kaj kvinan elementan klason; la studo de Esperanto helpas la
 postan lernadon de fremdaj lingvoj por la lernantoj.


(Heroldo)

ROTACIO ? ? En tiu periodo dum kiu oni festas
 la naskiĝtagon de Koperniko, la grando Polo kiu elmontris ke la
 tero rotacias ĉirkaŭ la suno, ni pensas pri alia "rotacio" :
 temas pri la, zorgoj ĵurnala Normanda Bulteno !

Ĉi tiu Efektivo, redaktante la N° 22an, oni povas legi sugeston
 rilata al la sendiro de la Bulteno. Kiu Grupo anoncu sin por la
 sekventa vico ? (dum oktobro) Notu ke S-ino Peltier estas preta
 liveri la maŝinon, kaj instrukciojn al la sekventa deĵoranta
 grupo, kie ajn en Normandujo

Beuzevillette

BUREAU DE YVÉTO



ATTENTU :


Amika kaj piknika intergrupa renkontiĝo okazos la
 1an de Julio ĉe la herbejo de Ges-roj Peltier en la
 vilaĝo Beuzevillette - Bonvenon al ĉiuj !

(Pluvegos ? ne ! tamen, ni havos la tendegon de
 Ges-Roj Pottier kiu ...okaze ŝirmos nin!)

ĈU VI SCIAS ??

..... ke Unuiĝo Franca por Esperanto finpretigas
sian novan sidejon : 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS -
metro : Bastille -

REBUSA PROVERBO



Laurence Caron -


SOLVO :

(il est avaré à tondre des oeufs)
- oje nes estas en muso ne estas sen fejo -
scène - fee - l'eau - Por li eĉ la muso ne estas sen fejo -
Porc - lit - hale - ĉ - la - m'houx - seau - ne s'tasse

ĈU VI SCIAS ??

..... ke la plej valora poŝtmarko eldonita
de Jugoslavio de-post la milito; estas la 100-dinara Esperanto-
poŝtmarko aperinta okaze de la Uniuersala Kongreso en Zagreb
en 1953

(HERCULE)



BANKO PERIOJN

AL ĈIUJ !

(sed ne forgesu sendi viajn
raportojn por la venonta
bulteno! Dankon.)

Polycopié par le
GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS